

Novaĵoj Tamtamas

Internacia Gazeto de Esperanto Jokohama (Hama-Rondo)

エスペラントよこはまのエスペラント文会報

Niaj klasoj

***Eseoj:** gvidas Doi Hirokaz, ĉe la Muzeo, en sabata posttagmezo. Provizore oni legas “El malnovaj rakontetoj en vilaĝo Ihatovo”, legendoj esperantigitaj de Satoo Ŝooiĉi. Poste oni revenos al la legado de nefikciaĵo “Homoj manĝantaj”.

***Jokohama Salono:** sen gvidanto, per Jitsi, en sabato 15:00-17:00. Principe la 1-an kaj la 3-an sabaton de monato oni legas “Paradizo Ŝtelta” de Trevor Steele. La 2-an sabaton oni interkritikas sian liberan frazfaradon, kaj la 4-an sabaton oni

interkritikas sian tradukaĵon el materialo libere elektita.

***erikoj:** gvidas Doi Ĉieko, ĉe la Muzeo, en merkredo de 13:30-15:30. Nun legata estas “Nokto de la Galaksia Fervojo” de Miyazawa Kenzi, tradukita de Konisi Gaku.

***Teksantoj:** gvidas Doi Ĉieko, per Zoom, en lundo. Nun legata estas “Falantaj Muroj” de Trevor Steele.

Noguĉi Hidejo kaj la kvarantenejo de Nagahama

Doi Ĉieko

Noguĉi Hidejo (Noguchi Hideyo, 1876 ~ 1928) estis kuracisto kaj bakteriologo.

Li naskiĝis en iu vilaĝo en la gubernio Fukuŝima, Nord-Orienta Regiono de Japanio. La patro de Hidejo estis poŝtisto. Hidejo, kies nomo registrita post la naskiĝo estis Seisaku, havis grandan brulvundon sur la maldekstra mano, erare falinte en *irorion* (hejtilo sur planko), kiam li estis nur unu-jara.

Poste li eniris en elementan lernejon. Lia patrino pensis, ke estos malfacile labori kiel terkulturisto pro la granda vundiĝo sur la maldekstra mano. Liaj instruistoj kaj kolegoj en la hejmloko kolektis monon, por ke li estu operaciita je la brulvundita maldekstra mano. Danke al la mono, post la fino de la kursoj en bazaj lernejoj, li estis operaciita kaj do li ekpovis uzi la manon kvankam ne estis perfekte.



Kortuŝite pro favoroj de multaj homoj li ekpensis fariĝi kuracisto. Dum tri jaroj kaj duono li laboris en la kuracejo de la doktoro kiu operaciis lian manon. Intertempe li eksciis pri bakteriologio

Li iris al Tokio kaj studis medicinon. Danke al helpoj de multaj homoj por la studado, li sukcesis fariĝi kuracisto, kaj li estis denove

operaciita je la vundita mano por pli libere uzi ĝin. Poste li eklaboris en la Izolmalsanulejo, kiun fondis Kitazato Ŝibasaburoo (fama kiel la patro de moderna medicino en Japanio). Tie li laboris ne kiel kuracisto sed kiel interpretisto. Siatempe li ŝanĝis sian propran nomon, de Seisaku al Hidejo, ĉar leginte iun siatempe faman romanon li eksciis, ke la protagonisto de la romano havas la nomon Nonoguĉi Seisaku, kiu tre similas al nia Noguĉi Seisaku. La protagonisto de la romano estis fiulo kun granda ŝuldo. Kaj do nia Noguĉi

Seisaku ŝanĝis sian nomon, de Noguĉi Seisaku al Noguĉi Hidejo per la helpo de sia iama instruisto en la lernejo.

Poste en 1899 li iris al la kvarantenejo de Nagahama, Jokohamo, kaj tie li laboris kiel kvarantenisto. Tiam enhaveniĝis la ŝipo nomata Ameriko. Li trovis malsanulon pro pesto. Taksite pro sia laboro li estis elektita kiel ano de Internacia Grupo Kontraŭ Epidemioj, kaj li estis sendita al Ĉinio, kaj fininte la laboron dum duona jaro li restis en Ĉinio ankoraŭ dum ioma tempo. Poste li iris al Usono kaj trovis postenon kiel helpanto en medicina fakultato. Tie li estis ordonita studi venenon de serpentoj.

En 1903 li estis ordonita studi en Kopenhago, Danlando, kie li studis pri sero. Poste reveninte al Usono li estis akceptita en la Medicina Esplor-Instituto de Rockefeller. Poste li publikigis, ke li sukcesis kulturi pure treponeman spiroketon. Pro tio li fariĝis konata en la medicina kampo tra la mondo.

En 1914 li ricevis doktorecon de la Universitato de Tokio, kaj fariĝis eĉ kandidato de Nobel-Premio, en la kampo de medicino.

En 1918 li estis sendita al Ekvadoro por esplori la kaŭzon de flava febro (vomito). Naŭ tagojn poste li sukcese trovis la kaŭzon de la malsano kaj vakcinon kontraŭ la vomito. Pro tio li estis nomita kiel honora kapitano. ktp, ktp.

Tiel li multe kontribuis en la medicina kampo.

En 1927 li estis ordonita iri al Akra (en Ora Bordo, nun la ĉefurbo de Ganao), kie furoris vomito (flava febro). Kelkajn monatojn poste li sendis telegramon al sia ĉefo, ke li preskaŭ trovis la viruson, kaŭzon de la malsano. Li intencis reiri al Usono, sed malsaniĝis verŝajne pro vomito. Ĉirkaŭ 10 tagojn poste lia vivo finiĝis.

Jen estis lia vivo, la vivo de Noguĉi Hidejo. Lia vivo estas fama al japanoj, ĉar li brave vivis malgraŭ la vundiĝo je la infaneto, kaj fariĝis mondfama kuracisto-sciencisto. En lernolibroj infanoj lernis kaj lernas lian vivon, kaj tio instigas lernantojn vivi kun kuraĝo kaj espero. Tamen nun oni scias lian vivon ankaŭ en iom negativa kampo. Li multe drinkis kaj foruzis monon je kontaktoj kun virinoj ktp ktp.

Tamen ĉi tie mi ne skribu pri tiaj aferoj. Mi skribu pri la Studejo de Noguĉi Hidejo, 1.5 km for de nia domo, do piede necesas nur duona horo.

Komence por preventi furoran malsanon

ĥolero oni konstruis kvarantenejon en la urbo Jokosuka en 1879, kaj en 1885 ĝi estis translokita al Nagahama, en la suda parto de Jokohamo. La domo estis nomita la kvarantenejo de Nagahama, kiun estris d-ro Kitazato Ŝibasaburoo, sub kiu laboris Noguĉi Hidejo (siatempo 22-jaraĝa) en 1890. Hidejo laboris tie nur 5 monatojn, sed lia laboro tie estis alte taksita de fakuloj kaj tio sekvis lian laboron poste.

Post la forlaso de Noguĉi, en 1923 okazis la Granda Tertremo en la suda parto de la distrikto Kantoo, kiu enhavas Tokion kaj ankaŭ Jokohamon. La domo falis pro la tertremo, sed en la sekva jaro ĝi estis rekonstruita. Poste pasis longa tempo, kaj en 1997 oni multege riparis kaj aperis preskaŭ nova kvarantenejo. Tiu domo nun estas ne nur ekspoziciejo sed ĝi servas ankaŭ kiel loko doni agrablecon al urbanoj. Okazas malgrandaj koncertoj; ĉeestantoj devas esti maksimume nur 25. Programero povas daŭri nur unu horon ktp. Do la ejo estas kvazaŭ ripozejo, kie oni povas havi komfortan agrablan tempon.



la bakteriologia laboratorio en la kvarantenejo



la rekonstruita kvarantenejo

(ĉiuj fotoj el vikimedia)

JOKOHAMO PLI NOVA (6)

SIBAYAMA Zyun'iti

Dua Kajo por Jokohamo – Martel-kapa Vakcinejo jam fininta la taskon

En la “Gvidlibro pri Jokohamo” en 2017, p.35 estis notita pri la Granda Kajo por la havenurbo Jokohamo.

En oktobro 2019, nova kajo por krozŝipoj estis pretigita, kaj la halo kun vendeja komplekso por la kajo estis nomita Jokohama “Hammerhead” (=Martel-kapo). La nomo devenas de “argano”, kiu iam funkciis por surlandigi / surŝipigi kargon de la kajo kiam ĝi plenfunkciis por kargoŝipoj antaŭ jardekoj. Nun la Martel-kapo estas desube videbla, kiel montras la foto (sed ne jam uzata).

La alia foto montras promenejon, sur kies pinto estas la supre menciita Martel-kapo, kaj vidiĝas konstruaĵo nun nomata Jokohama Hammerhead. Trans akvo videblas spektorado kaj ĉielskrapaj konstruaĵoj de Jokohamo. Kelkaj el la krozŝipoj, kiel “Asuka 2” uzas tiun ĉi kapon.



Ni geedzoj ja kelkfoje vizitis tiun Martelkapon... sed ne por ĝui ŝipkrozon, nek tie aĉetumi, kvankam ŝajne estas kelkaj indaj butikoj kaj restoracioj.

Multa parto de ĝia tera etaĝo estis uzita kiel vakcinejo kontraŭ Kovimo, de Urbo Jokohamo, kaj ni vizitis ĝin 5 fojojn. 4 fojojn ĝi funkciis nur por Moderna, kaj lastafoje ankaŭ alia estis dozebla. Estas bustrafiko al la ejo, sed ĉiuforte ni uzis senpagan busservon de urbo Jokohamo de la stacidomo Sakurgityo. La flava buso en la dekstra foto montras tian buson. De la elirejo de la stacio ĝis la busrajdejo, kelkaj homoj montris vojon kun ŝildo. Nu mi aŭdis, ke tiu Martelkapo finis funkcii kiel vakcinejo en la lasta jarfino, dank' al malmultiĝo de la novaj Kovim-pacientoj.



EL NIA MUZEO

Vizitis nin s-ro Garry Evans el Kanado

Posttagmeze de la 14a de februaro, la Muzeo akceptis gaston, s-ron Garry Evans el Kanado. En la lastajara UK en Montrealo, Kanado, li aktivis kiel ĉefaktoro en preskaŭmonologa teatraĵo “1910”. Li estis akceptita de 5 el niaj anoj, inter kiuj estis s-roj Suzuki Keiichiro kaj Namba Fumiharu, kiuj ĉeestis la nomitan UK. Aliaj gastigantoj estis s-ino Murata Kazuyo, ges-roj Doi Hirokaz kaj Doi Ĉieko.

eseo

En marto

Itabaŝi Micuko

Mi naskiĝis en marto antaŭ okdektri jaroj. Tiam mia familio loĝis en urbeto ĉirkaŭita de montoj en Gubernio Akita, kies antikva nomo estas Lando Deŭa. Oni diras, ke tie naskiĝis fama virina utaisto Ono no Komaĉi. Verdire neniu sciis, kie ŝi naskiĝis, kaj kie ŝi mortis. Nun ekzistas kelkaj tomboj nomataj kiel ŝiaj tomboj. Ŝi vivis en la naŭa jarcento kaj aktivis en kortego kiel utaisto. Ŝia patro estis nobelo. Tiutempe li administris kiel provincestro tiun regionon. Do, povas esti, ke ŝi naskiĝis tie.

Nu, mi rakontos, kiel mi naskiĝis. Mi estas la sepa infano de miaj gepatroj. Kiam mia patrino havis naskodoloron, estis jam vespere. Ekstere neĝo blovdadis. Mia plej aĝa frato iris al akuŝistino por peti helpon de la nasko, sed ŝi ne estis en domo. Ŝi estis en fora vilaĝo por helpi naskon de alia virino. Danĝere estis iri sola al nekonata vilaĝo. Nia patro ordonis mian plej aĝan fratinnon, ke ŝi akompanu al sia frato. La frato estis dekkvarjara kaj la fratino estis dekdujara. Ili reciproke ligis sin per ŝunuro kaj skiis cele al nekonata vilaĝo inter montoj en neĝblovo. Kiam ili atingis celatan domon, akuŝisto diris al ili jene: bebo ankoraŭ ne naskiĝis, kaj akuŝantino grave suferis, kaj ŝi ne povas lasi ŝin. En la urbeto estas eksakuŝistino. Tiu estas paralizita pro malsano, sed bone sciis pri akuŝo. Tuj iru al ŝi kaj petu helpon! En malluma vojo inter montoj miaj gefratoj reiris urbeton cele al la eksakuŝistino.

Bofilino de eksakuŝistino veturigis ŝin al mia domo per kestoforma sledo. Miaj gefratoj respektive laboris laŭ ŝia admono. Iu hakis lignaĵon, aliaj ĉerpis akvon el puto kaj boligis ĝin kaj tiel plu. Mia patro malmuntis tondilon, poluris ilin, ree muntis

ilin kiel tondilon kaj sterilizis en bolanta akvo por tondi mian umbilikoŝnuron. Dujara fratino ĝenis neniun kaj sidante apud fajro atendadis min foje kantante. Tiuj aferoj estis duonplende, duonŝerce rakontitaj al mi ĉiam en mia naskiĝtago.

Ono no Komaĉi interesis min. Ŝajne ŝi kaj mi naskiĝis en sama loko. Oni diras, ke ŝi estis bela kiel Reĝino Kleopatro. Ŝi ankaŭ estis talenta kaj sincera. Ankoraŭ nun restas ŝia nomo Komaĉi kaj estas uzata anstataŭ beleca virino. Probable plebo favoris ŝin pro ŝia karaktero. Ŝi volis pasigi sian lastan vivon en sia hejmloko. Survoje al ĝi ŝi mortis en orientnorda regiono, nuna Gubernio Mijagi proksima al Lando Deŭa

Laste mi deziras prezenti du utaojn de Ono no Komaĉi. Sed mi ne kapablas traduki utaon kiel poemon de Esperanto. Tial mi nur montros la signifon. En la lasta mi vidas ŝiajn vivprincipon kaj kompaton al senfortuloj.

花の色は 移りにけりな いたずらに わが身
世に降る 眺めせしまに

(hananoiroŭa ucuringerina itazurani
ŭagamijonihuru nagamesesimani)

Floro perdis sian koloron en longa pluvado, kaj la beleco forlasis min dum mia meditado.

われ死なば 焼くな 埋ず
むな 野に晒せ 瘦せたる犬
の腹を肥やせよ

(ŭaresinaba jakuna
uzumuna nonisarase
jasetaruinuno harao-
kojasejo)

Kiam mi mortis, ne kremaci min, nek enterigu, kaj lasu sur sovaĝa kampo, por ke malgrasaj hundoj satigu sin.

